

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

<http://satesperanto.free.fr/> *** retadreso: satesperanto@free.fr



Fotis: Rodoljub Jovanović, artfotisto

Februaro 2006 77-a jaro, n-ro 2 (1208)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €



SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

REFERENDUMO 2006

Rezultato



Ge-k-doĵ Kazue Audibert kaj Vincent Charlot nombradis ... voĉdonilojn.

1. La plenum-Komitato :

Kandidato: JES NE SINDETENO SEN VOĈO

Kandidato	JES	NE	SINDETENO	SEN VOĈO
Bannier	180	6	16	3
Barkoviĉ	192	7	4	2
Bustin	131	47	23	4
Cavalier	177	3	21	4
Lieblang	152	13	34	6
Markov	175	10	17	3
Prent	183	2	17	3
Sabatier	197	3	3	2
Schram	191	8	3	3

2. Ĝeneralaj Konsilantoj : :

Kandidato: JES NE SINDETENO SEN VOĈO

Kandidato	JES	NE	SINDETENO	SEN VOĈO
Chassard	172	4	29	0
Rooke	129	47	22	7
Yamasaki	182	2	12	9

Sekve al tiu ĉi referendumo, la nova Plenum-Komitato konsistas el 8 kandidatoj ricevintaj la plej grandan nombron da voĉoj: Bannier, Barkoviĉ, Cavalier, Lieblang, Markov, Prent, Sabatier kaj Schram. Ili komencos sian trijaran mandaton la 1-an de marto 2006.

ĈIUJ AL LA SAT-KONGRESO !



Ĉu vi ankoraŭ hezitas?

Nepre tuj aliĝu antaŭ la fino de la monato por profiti la plej favoran kotizon.

Krome reklamu pri tiu jubilea kongreso ĉe viaj konatoj kaj aliaj esperantistoj. Vi povas ankaŭ praktike reklami ĝin per la aĉeto de tiu bela kongresa T-ĉemizo kiu kostas nur 5 €.

Do, ni ĉiuj portu ĝin dum la kongreso en Beogrado.

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

Karaj,
en tiu ĉi februara numero, krom la rezulton de la referendumo kaj de pluraj aliaj artikoloj, vi trovos kritikon (verŝajne tute pravan") pri via gazeto. La kritikanto proponas ke oni kreu tutmondan redaktan komitaton kaj eldonu moderne enpaĝigitan revuon. Do, mi invitas vin anonci vin por realigi tiun proponon. Atendante viajn anoncojn, vian kunlaboron kaj modernigon de Sennaciulo, mi faris etajn ŝanĝojn jam en tiu ĉi numero, parte inspirante min per la revuo de nia fratorganizo SAT-Amikaro. Bonvolu do kritiki, doni vian opinion kaj fari proponojn.



Ankaŭ, sendu artikolojn kaj ilustraĵojn, por ke niaj legantoj povu ricevi rektajn informojn el diversaj landoj de la mondo. La paĝoj de Sennaciulo estas malfermitaj al viaj opinioj, kritikoj, proponoj kaj diskutoj. Uzu do tiun eblecon.

Esperante ke la realigo de tiu nova ideo revivigos SAT kaj venigos al ĝi multajn novajn membrojn, mi elkore kaj kamara-dece salutas vin.

Via aktuala, Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesperanto@free.fr.

TTT-paĝoj: <http://satesperanto.free.fr>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laboroj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin, Viola, C. Orsingher, Snajpero, I. Močilnik kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.



Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

N° CPPAP 0510 G 86567

Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

Hodiaŭ ni prezentas en nia rubriko "NOVA ORDO INTERNACIA" intervjuon kun la verkisto Maurice Rajsfus.


"ONI DONIS TERURAN POVON AL LA POLICISTOJ, KAJ ILI ĜIN TROUZAS"

Kiam li aĝis dekkvar jarojn, la nazioj efektivigis kontraŭ la judoj la tiel nomatan razion de la Vel d'Hive. Liajn gepatrojn kaj fratinojn oni deportis. Ili neniam revenis. De tiam li profunde spuris ĉion rilatantan la policon kaj la subpremadon. Multajn librojn li skribis pri ĉi tiuj temoj. Grupoj por defendo de la Homaj rajtoj el Eŭskio invitis lin pasintan septembron.*

posedas almenaŭ la abiturienton. La policistoj daŭras almenaŭ unu jaron. Kaj neniam ni havis policon tiel perforteman, seksdiskriminaciantan kaj rasisman.

D. Kio kaŭzas tion? Ĉu la sistemo mem aŭ tio ke ili estas rasistoj?

R. Ili ne fariĝas policistoj iel ajn. Kvankam la senlaboreco estas granda, la senlaboraj



Demando: Kiu estas la ĝeneralaj karakterizaĵoj de la polico?

Respondo: La nuntempa subpremadon ne estas tre malsama de tiu kiun ni konis dum la nazia epoko. Nun, je la fino de la subprempreco ne estas koncentrejoj aŭ *Auschwitz-oj*. Tio estas fundamenta diferenco. Sed tio ne signifas ke la agmaniero de la plejmulto el la policianoj ne estas vomiga. En urboj kie vivas multaj enmigrintoj ili agas neelteneble rasisme, perforteme kaj seksdiskriminacie. Do mi pensas ke ankaŭ en Eŭskio io tia ekzistas.

D: Kio donas al la polico la rajton esti perfortemaj kaj disdegnantaj?

R. Ili prenas por si la rajton. En la policlernejoj oni neniam instruis esti perforta kaj insultema. En la epoko kiam ni konis la plej senkompatan subpremon, la policistoj estis simplaj civitanoj, sen multaj studoj, ĵus finintaj la soldateservon. Nun, kontraŭe, tiuj kiuj eniras la policakademiojn

gejunuloj ne iĝas policianoj por trovi laboron. Do jam ekzistas antaŭe persona decido. Aliflanke oni donas teruran povon al la policistoj, kaj ili ĝin trouzas. Post la prezidentecbaloto de 2002 en Francio, la policistoj komentadis : "nun ni rajtas ĉion".

D. Ĉu ĉar venkis Chirac?

R. Jes.

D. Kaj kio okazus se tiam venkus Le Pen?

R. Tio ne okazis. La venko de Le Pen signifus trudi iun specon de faŝismo en Francio. Sed nun, en la okcidentaj landoj, oni vidas malneceson de faŝisma reĝimo por subpremadon. Ne plu estas bezonata Franco en Hispanio, nek Hitler en Germanio aŭ Petain en Francio. Niaj institucioj estas sufiĉe "grandaj" por uzi la timon kaj la tiranecon.

D: La sinteno de la policistoj ŝanĝiĝas laŭ tio kiu estras en la Ministrejo pri Internaj